# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- ILEI vokas al artistoj por VEKI
- Cervantes vokas el Hispanio
- KAEM virtualigas sian bultenon
- Edukado.net raportas el Ĉinio
- La Afrika Bulteno restas aktiva!
- EKO persistas tra ĉiu obstaklo!



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-26 sendita el Budapeŝto, la 11an de majo*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


# ILEI alvokas al artistoj kaj aliaj

ILEI devas kunveni rete en julio anstataŭ ĉeesti ĉiuj kune en Kebekurbo kiel planite. Ni planas vekiĝon, ni planas VEKI, la 53-an Virtualan Esperanto-Konferecon ILEI. Vidu detalajn informojn en EKO 21. VEKI okazos en la sama semajno, tio estas de la 25-a ĝis la 31-a de julio 2020. Vi povas vidi la programskizon ĉe www.ilei.info. Videblas, ke ni estos kune dum 13 horoj tage, vespere kaj nokte, tra la tuta mondo samtempe de Kalifornio ĝis Japanio.

En tiu programskizo aperas tri sesioj en ĉiu tago. Nia intenco estas, ke ĉiu sesio finiĝu per koncerto. Ni alvokas al artistoj, petante, ke ili sendu filmeton kun hejma koncerto por ILEI ĝis la 30-a de junio. Daŭro : inter 30 min kaj unu horo. Ni deziras havi en ĉiu sesio la lastan horon kun koncerto. Tio estas, ke ni devus akiri 30 kontribuojn. Ankaŭ povos esti koncertoj en rekta enreta partopreno ; por tio iu artisto aŭ artista grupo povas skribi al ilei.prezidanto@gmail.com, dirante : mi pretas ludi je tiu tago je tiu horo ! Bonvenon ! Pro tio ni ne havos Internacian Vesperon, ĉar ni ne vesperumos samtempe  kaj ĉar ni estos internacia grupo daUre tra la semajno.

Bonvolu anonci vian partoprenon ĝis la 15-a de junio, kun nomo, nomo de la grupo, kiuj instrumentoj, titoloj, autoroj, daŭro. Ĉu antaŭe filmita, ĉu en rekta dissendo.

Mi povas informi vin, ke la unua sesio "ĉefplado" de la unua tago, la inaugura "ceremonio" jam havas sian muzikan kulminon. Do mi kalkulas je via kontribuo por buntigi niajn kunvenojn, kiuj okazos sur nova platformo nun en konstruo, io kiel zomo au skajpo. Mi estas je dispono por respondi viajn demandojn.

Plie ILEI alvokas al lingvemuloj por la Lingva Festivalo (27-an de julio) al universitataj profesoroj por la Tago pri Universitata Agado (28-an de julio), al manĝemuloj por la Gastronomia Rondo (29-an de julio) kaj al pedagogoj por la Pedagogia Tago (30-an de julio). Detaloj sekvos en la retejo de ILEI: www.ilei.info.

Mireille Grosjean, prez de ILEI, 2020-05-09

# Cervantes kaj Don Kiĵoto (Quijote) por vi

Ekde la Internacia Tago de la Libro, la 23an de aprilo, datreveno de la morto de Miguel de Cervantes, Hispana Esperanto-Federacio regalas vin per dosiero kun la plena versio en Esperanto de lia majstra verko “La inĝenia hidalgo Don Quijote de La Mancha”. Elŝutu ĝin en la formato ePub el tiu ĉi ligilo:

https://www.esperanto.es/hef/index.php/295-don-quijote-en-esperanto.

Ĝi estas la perfekta okupo por tiu ĉi tago en tiu ĉi speciala periodo de deviga enhejmiĝo. Kaj ni povas fari tion kolektive: ni proponas al vi ke vi kunhavigu vian sperton kun la esperantistoj en la mondo. Filmu vin legante pecon de Don Quijote, vian preferatan aŭ iun hazardan. Sendu ĝin al la adreso hef@esperanto.es, kaj ni provos fari filmeton kun selekto de tiu kolektiva legado. Aŭ mem alŝutu vian legadon al la reto aŭ al sociaj retoj, kun la etikedo #DonQuijoteEnEsperanto.



Jen 3-minuta filmeto kun tri deklamoj el la verko Don Quijote kun eta surprizo por ke vi ridetu.
https://youtu.be/DZLnDkm7VXk

Federación Española de Esperanto / Hispana Esperanto-Federacio
Rodríguez San Pedro, 13, 3. ES-28015 Madrid (Hispanio)
Tel: (+34) 914 468 079 / (+34) 638 547 104; http://www.esperanto.es

# Esperanto en Azio kaj Oceanio dumtempe nur rete

Pro la pandemio ni ne presos nek sendos surpaperan (nigrablankan) eldonon de "Eo en Azio kaj Oceanio" al la kontribuintoj/abonantoj, ĉar ni volas eviti kunvenon por la ekspedo, kaj ankaŭ ĉar intertempe fermita estas la domo de Japana Esperanto-Instituto, kie niaj helpantoj laboras.

KAWAMOTO Hiromi (Kaŭa): anatiti.7@gmail.com

# <Edukado.net> pri Ĉinio

Bonvolu rigardi ĉi tiun filmeton de www.edukado.net, ne tiom pro la krona viruso [ĉiuj parolas pri ĝi lastatempe], kiom pro la instruado de Esperanto en lernejo [malmultaj parolas pri ĝi lastatempe]. La temo: "Kronvirusa intervjuo kun Wei Yubin - ..." de Katalin Kovats kaj aliaj.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=364

# La 41-a numero de *Esperanto en Afriko* ĵus aperis.

Enhavo:

- P1 Enkonduko
- P1 Telegrama komunik-listo por inform(iĝ)i pri Afriko
- P2 Diluvo en Uvira, peniga kruco por la lokaj esperantistoj
- P3 Uvira kiel fekunda grundo por la verda semo
- P4 Senegalo alvokas al entuziasmo kaj postpandemio
- P5 Senpaga aŭskultejo
- P5 Invito al la Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI
- P6 Interparolo kun togolandano pri la korona-viruso

- P7  Magadaskara terapio por preventi, flegi korona-viruson…
- P8  Forpaso el la togolanda Esperanto-medio
- P8  Korona-viruso por sin protekti kaj protekti la aliajn.

La revuo: https://www.esperanto-afriko.org/Esperanto%20en%20Afriko%20n-ro%2041.pdf



Inundoj en Uvira, DR Kongo, raportita en la Afrika Bulteno. Vortoj 680

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.